

Paulo Sergio Viana

Brazilaj indianaj legendoj

Facila legolibro



Sanpaŭlo, 2026

Brazilaj indianaj legendoj

Verkis: Paulo Sergio Viana

Enpaĝigis: José Roberto Tenório

Eldonis: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo –
Sanpaŭlo, 2026 (2-a eld.)

Presis: fabricadolivro.com.br

Kovrilbildo: Paulo S. Viana

Internaj ilustraĵoj faritaj per programo de artefarita
inteligenteco

Ĉi tiu verko estas uzebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo
Tutmonda, kun atribuo kaj sen modifo (CC BY-ND 4.0),
disponebla ĉe:

<https://creativecommons.org/licenses/by-nd/4.0/deed.eo>

© Paulo Sergio Viana (aŭtoro), 2026

V614b

Viana, Paulo Sergio.

Brazilaj indianaj legendoj: facila legolibro / Paulo
Sergio Viana. – 2^a. eld. – Sanpaŭlo: Esperanto-Asocio
de San-Paŭlo, 2026.

40 p. – 14 x 21 cm.

ISBN 978-85-67422-28-2

1. BRAZILAJ LEGENDOJ 2. INDIANOJ I. Titolo.

CDD 398

Kataloga slipo ellaborita de Neide Ap. de Freitas — CRB-8/9091.

Al la fidelaj anoj de Lorena Esperanto-Klubo

Sonia Cunha
Marly Correa
Johano Nascimento
Genésio Marcondes

kaj (kial ne?)

Erialdo Rodrigues Alves

mi kore dediças ĉi tiun modestan libreton

Tabelo de enhavo

Prezento	07
Akvofalo Iguassu	09
Boitátá	11
Caipora	13
Kiel aperis la luno	15
Kiel kreĝis la mondo	17
Kiel kreĝis la unua homo	19
La amazonia nimfeo	21
La amazonoj	23
La apero de gvarano	25
La deveno de manioko	27
La apero de la nokto	29
La legendo pri bovoŝiŝo	31
Rozkolora delfeno	33
Saci	35
Uirapuru	37
La aŭtoro	39

Prezento

Mitologio estas tre instrua studkampo. Se oni atentigas pri ĝiaj aŭtentikaj registraĵoj, tiam oni alvenas al kurioza kompreno pri la homa psiko. Per la simboloj de mitoj, legendoj kaj fabeloj, la homoj esprimas siajn plej kaŝitajn sentojn. Iliaj deziroj, timoj, kredemo, amemo, ĵaluzoj, kruelo kaj bonkoreco aperas en la senfina scenaro de rakontoj, kiujn oni ne rajtus epiteti kiel fantaziaj, ĉar ilia radiko estas la plej reala forto de konsciaj kaj nekonsciaj pensoj. Se oni emas koni la profundon de la homa spirito, oni devas iom ekkoni la diversajn mitologiojn tra la mondo.

La helena mitologio estas la plej konata en okcidento, eble ankaŭ en oriento. Fakte, ĝi estas riĉega kaj meritas sian famon, tiom da interesaj rakontoj en ĝi estas troveblaj. Ili fariĝis universalaj simboloj.

Tamen, estas interese kompari mitojn kaj fabelojn de diversaj prapopoloj, kiuj ne kontaktis

rekte unu la alian. Oni surprize trovas plurajn similajn elementojn en tiuj mitoj. Por la kreo de la mondo kaj de la homo, ekzemple, malsamaj popoloj, tute fremdaj inter si, aludas al kurioze similaj priskriboj.

Per ĉi tiu senpretenda kajero, en simpla lingvaĵo, ni proponas nur kelkajn fabelojn de sudamerikaj prapopoloj. Ni ambicias nur du modestajn celojn: unue, ke la leganto praktiku nian lingvon per tekstoj facilaj kaj interesaj; due, ke ĉi tiuj etaj paĝoj veku la apetiton de la leganto por ke li serĉu kaj esploru la mitologion de aliaj popoloj. Jen tio estos inspira studo.

La apero de akvofalo "Iguassu"

Akvofaloj "Iguassu" (pron. igũasu') estas majesta aro da 275 akvofaloj en la rivero Iguassu, inter Brazilo kaj Argentino, en vasta natura arbaro. La tuta parko estis kreita en la jardeko post 1930 kaj havas la statuson de Tuthomara Naturriĉaĵo. Oni elektis ĝin kiel unu el la *sep naturaj mirindaĵoj en la mondo*.



Indiana fabelo rakontas la kreon de tiuj belegaj akvofaloj. La tribo “Caiangue” (pron. kajange) vivis ĉe la bordo de la rivero Iguassu. La tribestro havis filinon, Naipi, kiu estis tiel bela, ke la akvo de la rivero haltis, kiam ŝi sin rigardis super ĝi.

Pro ŝia eksterordinara beleco, oni dediĉis tiun junulinon ekskluzive al la kulto de la dio Mboj. Tamen, juna indiano Taroba’ enamiĝis al Naipi. En la festa tago, kiam oni devis konsekri ŝin al la dio, Taroba’ kaj Naipi forkuris laŭ la rivera torento, sur kanuo. La dio Mboj eksciis pri la forkurado kaj furioziĝis. Ĝi tiam enpenetris la teron, skuis ĝin kaj kaŭzis teruran tertremon, kiu estigis grandan fendon. Tiel formiĝis la grandegaj akvofaloj.

Senkontrole en la torento, la du gejunuloj falis de alta krutaĵo kaj malaperis por ĉiam. Naipi transformiĝis en grandan rokon, kiun la akvo konstante frapas. Taroba’ transformiĝis en palmarbon, kiu kliniĝas super la rivero, borde de la abismo. Sub tiu palmarbo troviĝas groto, kie la venĝema monstro eterne gvatas la du viktimojn.